

Esperanto en Danio

28-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2021



Memoru ke la aliĝkotizo plialtiĝas ekde januaro!

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la prezidanto:

Peter Wraae

Eremitageparken 17 st, C

2800 Lyngby

☎ 60 70 79 69 peter@wraae.dk

Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88 386

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Finn Østerbæk (kasisto)

Ileana Schrøder (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Arne Casper Mortensen

Bent Jensenius

Pia Wettergren

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresanĝoj al:

Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45

finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.02.2022

Enhavo

Esperiga kultura nokto.....	3
Kopenhago.....	5
Aarhus.....	6

TEJO progresis ĉe UN.....	6
Premio La Torre anoncita de ILEI.....	7
Nova numero de Unesko-Kuriero.....	8
Unesko salutis UK.....	9

Nova Honora Patrono de UEA.....	10
Esp-tago proponata al Unesko.....	10
UEA pri lingvo kaj edukado.....	11
Konferenco de la Akademio	12

UEA-prezidinto ricevas premion.....	13
Lingvo, Konflikto kaj Sekureco.....	14
56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.....	14

Alvoko por Kongresa Universitato..	20
Diversloka agado.....	21
Tago de Unuiĝintaj Nacioj 2021.....	23

Elekto de UEA-komitatanoj B.....	24
La aĝo de Esperantistoj tutmonde..	25

Esperiga kultura nokto



La 15-an de oktobro DEA partoprenis en la Kultura nokto en Kopenhago. Jen la impresoj de nia prezidanto: ni prezentis nian lingvon en nia klubejo. Estis tre sukcese ĉar venis relative multaj da homoj. Entute 30 personoj trovis la vojon al Carit Etlars Vej 6, kie ni bonvenigis ilin kun teo/kafo.

Kelkaj estis scivolemaj kaj volis aŭdi pri esperanto kaj ĝia kulturo, kaj aliaj iom konis la lingvon. Interalie ni konatiĝis surprize kun junulo ĉirkaŭ dudekjara kiu lernis bazan nivelon en la reto. Li diris ke estis la unua fojo ke li parolis kun aliuloj en esperanto. Al kelkaj junuloj ni donis la telefonnumeron de la prezidanto de DEJO.

Finn, Bent kaj mi bonvenigis la gastojn en la antaŭa parto de la oficejo, kaj donis al ili enkondukon, kaj tiuj kiuj pli interesiĝis iris al la kuirejo kie Gosia kaj Pia pli detale priskribis la lingvon.

Grandan dankon al Pia kiu ekhavis la ideon, kaj malgraŭ okazis malebligo ŝi konvinkis la respondeculojn en la Kultura nokto komitato ke estis inda doni al ni permeson partopreni la programon.

Kaj jen la rimarkoj de Pia: Gosia kaj mi mem donis provleciojn pri la lingvo je diversaj niveloj. Ni bone kunlaboris kaj instruis eble 20 personojn!

Nun ni havas plurajn nomojn de homoj, kiuj havas intereson pri kurso. Ĉu eble nia klubo baldaŭ denove grandiĝos?

Estis vere plezuro instrui ĉiujn, kiuj alvenis. Junaj kaj malpli junaj. Do, certe la intereso ekzistas !



*Pia, Gosia kaj Finn antaŭ la kunvenejo
kaj rubando farita por la okazo*

Alia inform-ofensivo

La 23-an kaj 24-an de oktobro okazis la vojaĝfoiro "Vagabond" en la Bella-Centro. Lastmomente ni sukcesis tie akiri standon. Jen Ileana kaj Bent reprezentas nin.



Kopenhago

Nia kutima kunvenejo estas en Carit Etlars Vej 6, 1814 Frederiksberg C, en la kelo. Ĝenerale du fojojn monate – la unuan kaj trian lundojn.

Se estas problemoj eniri la domon, telefonu al 20 27 08 39 aŭ 60 70 79 69.

(Carit Etlarsvej estas flanko vojo de Frederiksberg Allé. Se vi venas per la metroo, eltrajniĝu ĉe la stacio Frederiksberg Allé kaj iru dekstren.)

15. novembro je la 19-a horo: Esperanto kaj la Unuiĝintaj Nacioj. Ileana (kaj eble aliaj) rakontos interalie pri la Unesko Kuriero.

29. novembro je la 19-a horo: Studgrupoj. Ni legos en la libro Paŝoj al plena posedo de William Auld, ĉapitro 10, alirebla en la ligilo

https://issuu.com/luisgui/docs/pashoj_al_plena_posedo_william_aul

Post laŭtleĝo de etaj paragrafoj ni diskutos lingvajn demandojn.

La ĉi-jara zamenhof-festo okazos
sabaton la 11-an de decembro je la 14-a horo
en la klubejo FAKTI,
Bispebjerg Bakke 6
2400 Kopenhago
(sama numero kiel en Carit Etlars Vej).

Aarhus

La Esperanto-klubo de Aarhus kunvenas en Carl Blochs Gade 28, 8000 Aarhus C. La prezidanto estas Tobias, telefono 41 24 40 64.

Vendrede, la 19-an de novembro 2021, 19:30 – 21:30:

Ludoj en Esperanto, gvidas Tobias.

Vendrede, la 17-an de decembro 2021, 19:30 – 21:30:

Zamenhof-Kristnaska festo.

TEJO progresis ĉe UN

Post longa klopodado, TEJO ricevis Specialan Konsultan Statuson ĉe Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj (EKOSOK) pere de kiuj ne-registaraj organizoj (NRO-j) estas reprezentitaj ĉe UN-instancoj.

Ĝis nun TEJO kaj junaj esperantistoj povis atingi Unuiĝintajn Naciojn (UN) nur pere de UEA, kiu ankaŭ ricevis la konsultan statuson en 1998. TEJO nun estas ankaŭ reprezentita memstare kaj kune kun UEA reprezentas Esperanton kaj la esperantistaron.

Konkrete, tio faciligos la aliron de TEJO al UN-eventoj kaj kunsidoj kie NRO-j estas invitataj, kaj tie defendi la poziciojn de TEJO.

TEJO nuntempe strebas strukturi sian agadon ĉe UN, varbante kaj trejnante novajn aktivulojn por agadi ene de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER), partnere kun UEA.

[EKO 2021-44]

Premio La Torre anoncita de ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kunlabore kun la familio La Torre anoncas konkurson pri esplorlaboro en unu el la kampoj, en kiuj laboris la karmemora prezidanto de ILEI, profesoro Mauro La Torre (1946-2010). En 2011 la Komitato de ILEI elektis profesoron Mauro La Torre honora membro de ILEI.

La esplor-kampoj estas:

- Aplikoj de lingvoteknologio al Esperanto kun rezultaj vortaroj aŭ pli ĝeneralaj
- lingvosciencaj pritraktoj
- Interkultura edukado per Esperanto
- Instruado de Esperanto kaj iloj por instrui Esperanton
- Perfektigaj kursoj por instruantoj de Esperanto
- Retaj kursoj pri Esperanto
- Evoluoj de la vorttrezoro de Esperanto tratempe kaj nuntempe



*Familio La Torre en dana parko en Klampenborg, en la somero de 2003, kadre de la kongreso de ILEI en Öresund, Svedio.
Fotis Stefan MacGill.*

La kandidatoj anoncu sian intencon partopreni kaj sian temon ĝis la 1-a de januaro 2022. La ILEI-estraro kaj la familio La Torre tiam starigos juĝkomisionon en rilato kun la temo de la esplorlaboro, kiu devas esti dokumentita kaj priskribita en raporto de almenaŭ 20 A4-paĝoj, maksimume 30 paĝoj. Kandidatoj transdonu siajn laboraĵojn rete al

ilei.prezidanto@gmail.com

ĝis la 30a de aprilo 2022; la prezidanto transdonos ilin al la familio La Torre, al ILEI kaj al la ĵurio.

La anonco pri la gajninto okazos antaŭ la 30a de junio 2022. La gajninto devos sendi naŭ paperajn ekzemplerojn de sia laboraĵo, tio estas al familio

La Torre kaj po unu, al diversaj gravaj Esperanto-bibliotekoj en la mondo laŭ la programo de ILEI “Ni Savu Niajn Semojn”.

La premio konsistas el sumo de 500 eŭroj. ILEI retenas al si la rajton eventuale aperigi la gajnintan raporton.

La konkurso La Torre okazis jam du fojojn, en 2015 kaj en 2018. La trian fojon, la premio kaj la diplomo estos transdonataj en la jaro 2022 okaze de la 55a ILEI-Kongreso en Kebekurbo kaj pli vaste prezentata en la 107a Universala Kongreso de UEA en Montrealo.

Ahmad Reza Mamduhi, prezidanto de ILEI

Nova numero de Unesko-Kuriero

Disponebla en ok lingvoj, inter tiuj Esperanto, la Unesko-Kuriero por aprilo-junio 2021 havas kiel ĉeftemon la defiojn kiujn frontas la hodiaŭa junularo. Juneco, krom amuza kaj ekscita tempo, ĉiam estas malfacila, kun duboj kaj gravaj decidoj. La revuo pritraktas la efikojn de la Pandemio de KOVIM-19 sur la vivo de junuloj ĉirkaŭ la mondo. Sed ĝi ankaŭ montras la gravan rolon de la junularo, kiu ne akceptas malegalecon, batalas por mediprotektado, antaŭenigas solidarecon kaj defendas demokration.



La numero enhavas ankaŭ aliajn gravajn temojn, kiel ekzemple la efikojn de konspiraj teorioj, la situacion en Haitio, kaj la lingvan malegalecon de interreto. Ĉi-lastas estas aparte interesa al esperantistoj, kiuj jam delonge argumentas, ke la plej potencaj mondaj lingvoj emas domini internacian komunikadon kaj emas neglekti la parolantojn de aliaj lingvoj.

Unesko salutis UK



“Unesko estas feliĉa kaj fiera labori flanke de UEA ekde jardekoj por antaŭenigi la kulturan kaj lingvan diversecon, same kiel por antaŭenigi la gravecon de tiu diverseco por konstrui kaj fortigi pacon.” Per tiuj vortoj, transdonitaj per mesaĝo de la Vica Ĝenerala Direktoro Tawfik Jelassi, la ĝenerala direktoro de Unesko sinjorino Audrey Azoulay sendis siajn salutojn al la nunjara Virtuala Kongreso de Esperanto, organizita en julio de Universala Esperanto-Asocio. La saluto de Unesko aparte

laŭdis la laboron de la Asocio por enkonduki aperigon de la Unesko-Kuriero ankaŭ en Esperanto – tasko nun plenumata de Ĉina Esperanto-Ligo, landa asocio aliĝinta al UEA.

Dumilo da homoj, el pli ol cent landoj, partoprenis la Virtualan Kongreson. Inter la diskutitaj temoj, aldone al la laboro de UEA kaj al prelegoj, seminarioj, kaj muzikaj kaj teatraj prezentoj, estis la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido 2021, deklarita de Unesko kaj la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. La kongreso dediĉis apartan atenton ankaŭ al la temo interkultura kompetento.

La Asocio esperas renkontiĝi fizike en Montrealo en la venonta jaro. La kongrestemo de 2022 estos plia elpaŝo de Unesko: “Lingvo, Vivo, Tero: La Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj.”

[Esperanto por UN 54]

Fama brazilo Honora Patrono de UEA



Multjara brazila esperantisto, Marco Americo Lucchesi, estis lastatempe nomita de la estraro de UEA al la Honora Patrona Komitato de la Asocio. Lucchesi, profesoro de la Federacia Universitato de Rio-de-Janeiro kaj bone konata kiel verkisto, estas la nuntempa prezidanto de Brazila Beletristika Akademio, unu el la plej respektataj institucioj de Brazilo.

Li estas konata pro sia defendo de indiĝenaj lingvoj kaj homaj rajtoj. Sub lia gvido konstante okazas edukaj kaj literaturaj projektoj en malriĉaj kvartaloj kaj en prizonoj. Pri li Umberto Eco, itala fakulo kaj kritikisto, diris: “Lia intensa, kreiva laboro rezultigis verkaron belegan.” En 2019, li fariĝis la unua prezidanto de la Brazila Beletristika Akademio kiu ricevis indiĝenajn reprezentantojn kiel prelegantojn en indiĝenaj lingvoj en la Akademio.

Lucchesi lernis Esperanton dum sia junaĝo (li naskiĝis la 9-an de decembro 1963) kaj publike subtenas tiun lingvon. Li estis akceptita al la Honora Patrona Komitato de UEA dum la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), la 24-an de julio 2021.

Internacia Esperantotago proponata al Unesko

La 26-an de julio, la dato de publikigo de Esperanto en 1887, estas festata en la Esperanto-movado kiel Internacia Esperanto-Tago, tago kiam Esperanto-parolantoj memoras la multajn kontribuojn de la lingvo al la paca movado, al internacia kompreniĝo, kaj al la lukto por lingva justeco.

Esperanto jam estis deklarita nacia nemateria kultura heredaĵo de Pollando kaj Kroatio, la Unesko-kuriero aperas en Esperanto, kaj lastatempe aperis Esperanto-traduko de volumo kiu markis la unuajn sepdek jarojn de tiu organizo. Tra sesdek jaroj UEA kontribuas al la laboro de Unesko por alproksimigo de okcidento kaj oriento per sia Serio Oriento-Okcidento de literaturaj tradukoj.

UEA sendis oficialan leteron al Unesko, kaj naciaj Esperanto-asocioj laboras kun la naciaj Unesko-komisionoj en la propraj landoj.

UEA intervenas pri lingvo kaj edukado

En serio da intervenoj de unu el la reprezentantoj de UEA ĉe UN, Francis Hult, Prof. Hult atentigis pri la graveco de lingvo en edukado. En la iniciato de Unesko, Edukadaj Estontecoj, kaj en antaŭpreparaj diskutoj pri la Agadprogramo Doha pri Plej Ne-evoluintaj Landoj, prof. Hult memorigis, ke multaj junuloj ne havas aliron al edukado en lingvo kiun ili



komprenas. Memevidente, tio konsistigas grandegan obstaklon al bonkvalita edukado kaj eduka egaleco. Raportoj de Unesko kaj la Monda Banko montris, ke multaj landoj ne havas politikojn pri multlingva edukado, kaj ke, tie kie politikoj ekzistas, ili estas nekomplete realigataj.

Lingva aliro al edukado estas esenca, ne nur por lernado, sed ankaŭ por ĉiuj aspektoj de evoluigo. UEA, kiel ĝi ripete emfazis, subtenas multlingvan edukadon kiu inkluzivas la gepatran lingvon, kune kun lingvoj de pli vasta komunikado – regiona, nacia, kaj internacia.

[EKO 2021-42]

Konferenco de Akademio de Esperanto

Okaze de la Zamenhof-festo, Akademianoj prezentos per Zoom konferencon pri diversaj temoj interesantaj kaj la Akademion kaj la ĝeneralan publikon, inaŭgurante novan kontakton inter nia Instituto kaj la Esperantistaro. Ĝi okazos:

Mardon, 14an de decembro, 13a – 14a20 UTC (14a – 15a20 laŭ mez-eŭropa horo)

- Probal Dasgupta: Ebloj kaj malebloj en la emfaza ripetado de afiksoj Esperantaj
- Sergio Pokrovskij: Maltrafoj (Kiojn mi volis sed ne sukcesis fari en la Akademio)
- Javier Alcalde: Socia historio de Esperanto. Kial? Kiel? Kien?
- Grant Goodall: Schleyer kaj Zamenhof kiel lingvokreantoj: substantiva morfologio en Volapük kaj Esperanto

Merkredon, 15an de decembro, 13a – 14a40 UTC (14a – 15a40 laŭ mez-eŭropa horo)

- François Lo Jacomo: Ĉu modernigi la Akademion?
- Aleksandro Shlafer: Kiel la Akademio kontribuu al Vikipedio?
- Cyril R. Brosch: La Konsultejo de la Akademio
- Bertilo Wennergren: La nun okazanta revizio de PIV, en kiu partoprenas pluraj Akademianoj
- Carlo Minnaja: Proklamo de la Laŭro de la Akademio 2021.

La konferenco estos spektebla per Zoom:

<https://us06web.zoom.us/j/83523650485>

ID de la kunsido: 835 2365 0485 (ankaŭ atingebla telefone, ĉe pluraj telefonnumeroj depende de via lando).

Bonan spektadon!

La estraro de la Akademio

Eksprezidanto de UEA ricevas ŝtatan premion



Ĉi-jare, la Premio Vidyasagar en Barato estas por la unua fojo aljuĝita al esperantisto. Tiun ĉi premion, rilatantan al la tuta verkaro de la respektivaj aljuĝitoj, la registaro de la gubernio Okcidenta Bengallando lanĉis en 1980 honore al la memoro de la granda klerulo, edukisto, instituci-konstruinto kaj soci-reforma pioniro Ishwar Chandra Vidyasagar (1820–1891). En 2021 ĝi estis rebaptita al Premio Vidyasagar-Dinamoyee (kunhonore al lia edzino) kaj estas nun aljuĝata de la registara fako pri supera eduko kunlabore kun la nove establita Akademio Vidyasagar.

La 26-an de septembro 2021, okaze de la 201-a naskiĝdatreveno de Vidyasagar, laesperantista lingvisto Probal Dasgupta kaj tri samtempaj premiitoj (en aliaj sociaj kaj edukaj terenoj tuŝitaj de la pioniraj strebadoj de Vidyasagar) ricevis la Premion. Tio okazis en la ejo de la akademio Vidyasagar en Kolkato, domo en kiu la klerulo mem loĝis en la finaj jaroj de sia vivo.

Probal Dasgupta, studinta en sanskrita kolegio (Kolkato), la dekana kolegio de Puneo kaj novjorka universitato, instruis lingvosciencan en la universitato de Kolkato, la dekana kolegio, la universitato de Hajderabado kaj la barata statistika instituto en Kolkato; de tiu lasta posteno li emeritiĝis en 2018. Esperanton li helpinstruis en 1978 kun David Jordan en la sanfranciska somera kursaro, kiu estis la praformo de NASK, kaj en 1988 kun Marjorie Boulton en la barlastona somera kursaro.

Dasgupta estas honora membro de la lingvistika societo de Usono jam de 2004. La barata konsilio pri filozofia esplorado nomumis lin sia vizitprofesoro de la jaro por 2009. En 2012 estis aljuĝita al li la Premio Archana Chaudhuri de Bangiya Sahitya Parishad, la bengala literatura akademio. En 2006 li estis prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (por la ekzamenoj ILEI-UEA). De 2007 ĝis 2013 li estis Prezidanto de UEA. De 2016 ĝis 2022 li estas prezidanto de la Akademio de Esperanto.

[GazKom UEA 987]

Lingvo, Konflikto kaj Sekureco

La angla kaj Esperanto estis la du lingvoj uzataj por la simpozio pri Lingvo, Konflikto kaj Sekureco kune organizita de la Ulstera Universitato (Belfasto, Nord-Irlando) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), kun financa subteno de Esperantic Studies Foundation (ESF). Unu el inter okaza serio de simpozioj nomataj laŭ la memoro de la japana diplomato Inazo Nitobe, vica ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj, la renkontiĝo kunigis grupon de internaciaj fakuloj pri la temo la 26-an kaj 27-an de julio.

Kvar ĉefaj subtemoj estis konsiderataj: lingvopolitiko en Nord-Irlando, la lingvo en humanaj krizoj, la lingvo en sekureco kaj konfliktoŝolvado en Eŭropo, kaj la antaŭenigo de lingva justeco.

Inter la parolantoj en la virtuala kunsido estis fakuloj el nordamerikaj kaj eŭropaj universitatoj kaj el la Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, kaj Unesko.

[Esperanto por UN 54]

56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj



Litova Esperanto-Asocio afable invitas vin partopreni vicajn ĉiujarajn internaciajn somerajn tradiciajn la 56-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-56). La aranĝo estas dediĉata al la 770-jariĝo de Klaipėda.

DATO: la 9-17-an de Julio, 2022. Veni al la aranĝo eblas jam la 8-an de Julio.

CELOJ kaj TASKOJ: studi problemojn de Esperanto-movado, elstarigi la nuntempajn ĉefajn taskojn de la Esperanto-agado, interŝanĝi sperton pri esperantista laboro, perfektigi en Esperanto, enhavoriĉe pasigi la tempon. Baltiaj Esperanto-Tagoj okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.

LOKO: BET-56 okazos en la havenurbo de Litovio KLAIPĖDA, kiu situas apud Balta maro, 300 kilometrojn okcidenten for de la ĉefurbo de Litovio Vilnius.

Ĝi estas la tria laŭ grandeco urbo de Litovio, grava industria kaj kultura centro. Klaipėda estas centro de la samtitola Litovia regiono. Klaipėda estas fondita en 1252 jaro. Nun ĝi havas ĉirkaŭ 153 000 loĝantojn.

La ĉefa lokalo de BET-56 estos la moderne kaj bonege ekipita universitato de Klaipėda (str. H. Manto 84), kie funkcios ĉiuj programeroj de BET-56. La universitato situas en la centro de la urbo. La loko estas libere kaj facile atingebla buse kaj aŭtomobile.

La partoprenantoj de BET-56 havos luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo. Ili povos libere kaj senlimige uzi la tutan infrastrukturon kaj servojn de la universitato (kunsidejojn, salonojn, aŭditoriojn, studentajn domojn, universitatan kafejon, la plej modernajn teknikaĵojn, multajn komputilojn kun libera reta aliro k.s.). Krom tio, la universitato havas sian botanikan ĝardenon kaj du ŝipojn Brabander kaj Odisėja, kiuj ankaŭ estos uzeblaj por ekskursoj kaj aliaj bezonoj de BET-anoj. BET-56 havas subtenon, kunlaboron kaj diversflankan helpon de la urba municipo kaj ankaŭ de la tutlandaj ŝtataj instancoj.

PARTOPRENO

Ni invitas ĉiujn esperantistojn. Speciale ni dezirus vidi esperantistojn el la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj najbaraj kaj pli foraj landoj. La kvanto de la partoprenantoj ne estas limigita. Ni atendas minimume 500 gastojn el 30 – 40 landoj.

ALIĜKOTIZO

Ĝis 31 Dec. 2021:

a) 50 eŭroj por esperantistoj el ekssovetiaj kaj ekssocialismaj Eŭropaj landoj;

b) 70 eŭroj por okcidentanoj kaj egaluloj.

Ekde 01 Jan. 2022 aliĝkotizo por ambaŭ aliĝkategorioj kreskos je 10 eŭroj (do, 60 kaj 80 eŭroj).

Infanoj, lernantoj kaj studentoj aliĝkotizon ne pagas. Pageblas en ajna konvertebla valuto.

ALIĜO

Por aliĝi necesas plenigi aliĝilon kaj sendi ĝin poŝte al Litova Esperanto-Asocio: p.k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio.

Plenigitan aliĝilon eblas sendi ankaŭ rete al litova.ea@mail.lt.

Retan aŭtomatan aliĝilon vi povas trovi en la retejo de BET-56:
<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56>

Samtempe pagu aliĝkotizon. Paperaj aliĝiloj riceveblas ĉe LEA kaj estas troveblaj rete.

GRAVE! Esperantistoj, kiuj grave kontribuos al la programo de la aranĝo aŭ / kaj signife helpos organize, aliĝkotizon ne pagos.

PAGEBLECOJ

1. sendi poŝte/ĝire al konto de kasistino de BET-56 Irena JAGMINAITĖ – LT687300010157748186 en SWEDBANK, SWIFT kodo HABALT22XXX;
2. pagi per kontanta mono dum la esperantistaj aranĝoj al s-ino Irena JAGMINAITĖ kaj aliaj organizantoj de BET-56;
3. interkonsenti kun la Organiza Komitato pri alia pagmaniero;

4. esceptokaze, kun konsento de la Organiza Komitato, pagi surloke ĉe veno al la aranĝo, se ne eblas anticipa pago.

Aliĝkotizo ne estas repagebla. Aliĝo sen pago de kotizo ne validas (krom speciale interkonsentitaj kazoj).

LOĜADO

Partoprenantoj de BET-56 povos loĝi :

1. En studenta domo de la universitato (Universiteto al. 12) situanta en la universitata urbeto mem:
 - a) unulitaj ĉambroj (limigita kvanto) – prezo 35 eŭroj tagnokte;
 - b) dulitaj ĉambroj – prezo 30 eŭroj tagnokte pro unu lito.Necesejoj kaj lavuoj apud la ĉambroj. Duŝejoj por du aŭ kvar personoj.
2. En studenta domo de la universitato (av. Statybininkų 43) iom for de la urbocentro:

Dulitaj kaj trilitaj ĉambroj. Prezo de unu lito tagnokte estas 20 eŭroj. Necesejoj kaj lavuoj estas apud ĉambroj. Duŝejoj estas komunaj por tuta etaĝo.
3. En studenta domo de la Litovia supera marista lernejo (str. Karklų 2). Situas apud la universitato. Dulitaj kaj trilitaj ĉambroj. Prezo de unu lito tagnokte estas 20 eŭroj. Necesejoj, lavuoj kaj duŝejoj estas apud la ĉambroj.

Se nesufiĉos tiuj proponoj, la organiza komitato aldone rezervas ĉambrojn en studentaj domoj ankaŭ de Ŝtata kolegio de Klaipėda, Turisma lernejo de Klaipėda, Klaipėda instrua centro k.a. La kondiĉoj estas analogaj.

Dezirantoj povas loĝi ankaŭ en multaj diversnivelaj kaj diversprezaj hoteloj kaj gastejoj de la urbo. Ilin mendu memstare. Plena grandega listo de urbaj hoteloj kaj gastejoj trovoblas ĉe klaipedatravel.lt/nakvyne/. La informoj estas en la litova, angla, germana kaj rusa lingvoj.

Pagu pro la loĝado, same kiel la aliĝkotizon, dezirinde laŭeble pli frue, esceptokaze eblas pagi ankaŭ surloke, veninte dum la registrado.

MANĜADO

En la universitata kafejo Jogundė. Oni servos modestan matenmanĝon kaj normalan tagmanĝon. Orientiga unutaga prezo de ambaŭ estas 10 eŭroj (3 eŭroj matenmanĝo kaj 7 eŭroj tagmanĝo). Eblos organizi vegetaran manĝon. Vespermanĝon ĉiu organizu memstare laŭplaĉe. Pagu same kiel aliĝkotizon, laŭeble pli frue, esceptokaze eblos pagi ankaŭ surloke, veninte dum la registrado.

PROGRAMO

Tradicia, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, scienc-teknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, ripozado en naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, diservo, interkona vespero, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero.

La Organiza Komitato atendas proponojn, sugestojn, ofertojn por la programo, ankaŭ sinproponojn.

KELKAJ GRAVAJ RETEJOJ

Urbaj turismaj informoj: klaipedatravel.lt. Informoj estas en la litova, angla, germana kaj rusa lingvoj.

Urba mapo: klaipedatravel.lt/en/map/ en la litova, angla, germana kaj rusa lingvoj.

Vikipedio pri Klaipėda en Esperanto:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Klaipeda>.

VIZOJ

Al Litovio senvize rajtas veni civitanoj de ĉiuj landoj de Eŭropa Unio kaj de multaj aliaj landoj. Aliajn vizojn havigu memstare en Litoviaj ambasadejoj kaj konsulejoj en diversaj landoj. En problemaj kazoj turnu vin por helpo al Litova Esperanto-Asocio. Se necese, LEA povas sendi oficialan inviton.

ALIAJ GRAVAĴOJ

Komence de Junio, 2022 rete aperos Informilo N-ro 2 kun pli detalaj kaj aktualaj informoj pri BET-56.

Ni antaŭvidas eldonon de ĉiutaga gazeto dum la tuta periodo de la aranĝo.

Aktualajn informojn pri BET-56 Vi povas trovi en retejo de BET-56: www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56

Aktualaĵojn pri BET-56 konstante publikigas ankaŭ novaĵretejo La Balta Ondo (sezonoj.ru/bet) kaj la reta revuo La Ondo de Esperanto.

Ankaŭ estas kreita eventopaĝo de BET-56 en Facebook.

KONTAKTOJ DE LEA

Adreso: p.k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio

Poŝtelefonoj: +370-687-12219 (Povilas JEGOROVAS); +370-611-60402 (Asta NASTARAVIČIŪTĖ).

Retadresoj:

- Litova Esperanto-Asocio: litova.ea@mail.lt
- prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas JEGOROVAS: pjegorovas@yahoo.com
- respondeca sekretario de Litova Esperanto-Asocio Asta NASTARAVIČIŪTĖ anasturte@gmail.com.

La litovaj esperantistoj faros ĉion eblan por ke BET-56 estu vere altnivela internacia esperantista aranĝo kaj programe kaj organize. Bonvolu jam nun plani Vian partoprenon en BET-56 kaj notu tiujn datojn en Via Esperanto-Kalendaro. Ĉiuj estas petataj disvastigi informojn pri BET-56 vaste tra la tuta mondo.

BONVENON AL LITOVIO!

La Organiza Komitato 28 Jul. 2021

Alvoko por la Kongresa Universitato

Kadre de la 107-a UK en Montrealo okazos la 75-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas proponojn pri IKU-prelegoj, kiuj estu sendataj al la IKU-sekretario (amri@huji.ac.il) plej laste la 31-an de januaro 2022. Estas planate organizi la Montrealan UK hibride, do ankaŭ la IKU-AIS-prelegoj povas esti ĉeestaj aŭ virtualaj. La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto – sume ne pli ol unu paĝon. La proponoj estos profesie prijuĝitaj de la IKU-komisiono. Tiuj kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos tamen esti konsiderataj por la Scienca Kafejo.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de 240 EUR. Por IKU-AIS-kurso la honorario estos 300 EUR kaj por Scienca Kafejo – 120 EUR. Duono de la honorario dependas de ĝustatempa livero de la teksto por la IKU-libro kaj duono de la fizika prezentado de la prelego. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumo troviĝas en la retejo de IKU: uea.org/kongresoj/universitato.

Diversloka agado

– En Germanio oni planas la 19-an Novjaran Renkontiĝon (NR) por ĉi tiu jarfino, de la 27-a de decembro 2021 ĝis la 3-a de januaro 2022, en la junulargastejo de Wiesbaden, kie ni jam dufoje kunvenis. Eble ankaŭ vi ŝatos partopreni, same kiel la 48 homoj, kiuj jam aliĝis. Informojn vidu ĉe <http://www.esperantoland.org/nr/#nr> kaj la aliĝilon ĉe la adresp <http://www.esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo>.

– Nordio vere refortigas sin, elstare en Norvegio. Ĝia jarkunsido elektis novan estraron: Bård Hekland, prezidanto; Jardar Eggesbø Abrahamsen, vicprezidanto; Marianne Lund, sekretario; Claude Rouget, kasisto; Lars Sandbakk, estrarano.

– La Estraro de ILEI 2021-2024 konsistas el Ahmad Reza Mamduhi el Irano, prezidanto; Alessandra Madella el Italio, vicprezidanto; Elena Nadi-kova el Rusio, sektretario; Karine Arakeljan el Armenio, estrarano pri financoj; Laura Brazzabeni el Italio; Marija Jerković el Kroatio; Fernando Pita el Brazilio; Radojica Petrović el Serbio.

Sume estas ok estraranoj, el kiuj kvin estas virinoj. Tio sekvas longan tradicion en ILEI pri akceptado kaj valorigo de virinoj. Logike, ĉar virinoj ludas signifan rolon en edukado ĝenerale. Ĝis 2024 ILEI devas pripensi minimume du fizikajn kongresojn, espereble tri, kune kun simpozioj kaj espereble AMO-seminarioj.

– Mesaĝis membro de la eŭropa komisiono de UEA, el kiu vi povas kompreni, ke la agado por atentigi pri Esperanto en la kadro de la tiel nomata "konferenco pri la estonteco de Eŭropo" komencas efiki. Oni almenaŭ debatos pri ĝi. Dankon al ĉiuj membroj, kiuj partoprenis la agadon, kaj inviton al la aliaj legi ĉi tiun paĝon:

https://uea.org/vikio/Konferenco_pri_la_estonteco_de_Eŭropo

[EKO 2021-36 kaj 41]

Tago de Unuiĝintaj Nacioj

24 oktobro 2021

| Unuiĝintaj Nacioj
| por ĉiuj popoloj



Universala Esperanto-Asocio

#UNtago

Tago de Unuiĝintaj Nacioj 2021

La 24-an de oktobro 2021, ni festas 76 jarojn de Unuiĝintaj Nacioj, la plej ampleksa internacia organizo, la plej ambicia elpaŝo por internacia diplomatio, kaj nuntempe la plej grava institucio por trovi kaj antaŭenigi tutmondajn solvojn por tutmondaj problemoj.

La nuntempaj defioj, ekde klimatsanĝiĝo ĝis genra malegaleco, ekde malsato ĝis malsato, ekde deviga migrado ĝis maljusta diskriminacio, ekde KOVIM-19 ĝis malsanaj vivkondiĉoj, ekde misinformado ĝis malriĉeco, montras, ke la mondo bezonas multe pli da multflankismo kaj kunlaborado. Kaj por tio ni devas konstrui la UN-on kiun la popoloj de la mondo bezonas.

Konfido kaj solidareco konsistigas esencan vojon por resanigi la mondon kaj konstrui pli bonan estontecon. Ni bonvenigas la vortojn de la Ĝenerala Sekretario António Guterres, en sia Komuna Tagordo, ke ni estas en turnopunkto de la historio: la alpaŝo al pli daŭripova kaj paca estonteco por la popoloj de la mondo kaj por la mondo kiel tuto dependas de ni, la nuna homaro – kaj de niaj decidoj.

Post kelkaj tagoj, malfermiĝos en Glasgovo la Konferenco de UN pri Klimatsanĝiĝo, en kiu oni pridiskutos ne iujn lokajn problemojn aŭ regionajn malfacilaĵojn, nek tutmondajn problemetojn, sed la efektivan estontecon de la planedo kaj, kun ĝi, de la homa specio. Ĉu ĉi-foje, ĉu en tiu ĉi Internacia Jaro de Paco kaj Konfido, UN kaj ties membroj trovos la kuraĝon rekte alfronti tiun demandon? Ĉu la voĉoj de la homoj, en ĉiuj ties lingvoj, estos aŭskultataj de UN kaj la diversaj ŝtatoj?

Ni speciale atentigas pri la fundamenta rolo de lingvoj, en atingo de la Celoj por Daŭripova Evoluigo. Ni bezonas aŭskulti ĉiujn voĉojn kaj paroli kun ĉiuj. Tio eblas nur en mondo en kiu la diversaj lingvoj kaj iliaj parolantoj estos plene respektataj kaj UN praktikos maksimuman multlingvecon kaj elserĉos ĉiujn rimedojn por superi lingvajn barilojn.

Diskriminacio kontraŭ unuopaj lingvoj kaj ties parolantoj estas neakceptebla.

La Esperanto-movado, kaj ene de ĝi Universala Esperanto-Asocio, antaŭenigas internacian kunlaboron, komprenemon kaj amikecon. Per la lingvo Esperanto ni disvastigas la mesaĝon de UN al ĉiuj anguloj de la mondo kaj per uzo de la lingvo ni praktikas aŭtentikan tutmondan dialogadon. Esperantistoj aktive partoprenas en internaciaj iniciatoj, kaj Universala Esperanto-Asocio, en sia konsulta statuso kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, klopodas disvastigi, pere de la Internacia Lingvo Esperanto, informojn pri UN, kaj varbi subtenon por ĝi. Ni favoras multlingvismon, kaj ankaŭ klopodojn komunikiĝi trans la diversaj lingvoj.

En ĉi tiu tago plena je espero, ni invitas ĉiujn kuniĝi por realigi la celojn de UN: tutmondan pacon, tutmondan aplikon de homaj rajtoj, kaj tutmondan daŭripovan evoluigon.

[GazKom UEA 990]

Elekto de UEA-komitatanoj B

En 2022 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2022-2025. Parto de ĝi estos elekto de komitatanoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art.24) oni elektas unu komitatano B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM oni elektos kvin komitatanojn B.

La Ĝenerala Regularo (art. 8) difinas: “Dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas proponi unusolan kandidaton el inter la individuaj membroj. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn.”

Kompletaj proponoj atingu la Centran Oficejon de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) ĝis la 31-a de januaro 2022. Proponoj devas esti subskribitaj, do eblas uzi poŝton, fakson: +49 30 364 280 169 aŭ sendo de elektronike subskribita dokumento al la retpoŝta adreso: bkomitatanoj2022@co.uea.org.

Por faciligi la kolekton de subtensubskriboj vi trovas formularon ĉe uea.org/l/teko/komitataj/Kandidatigilo_Komitatanoj_B_2022_2025.pdf

La uzo de formularo ne estas deviga. Eblas subteni per iu ajn subskribita dokumento.

Ĉiu kandidato devas esti IM de UEA dum la du antaŭaj jaroj (t.e. 2020 kaj 2021) kaj, se elektita, resti IM tra la tuta oficperiodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Komitatano, kiu persone ĉeestis neniun komitatkunsidon en la periodo 2016-2021, ne estas reelektebla.

Se ne estos pli ol kvin kandidatoj, ili ĉiuj estos elektitaj sen voĉdonado. Se la nombro estos pli granda, la individuaj membroj elektos kvin komitatanojn B per reta/poŝta balotado.

La aĝo de Esperantistoj tutmonde

La 77-a AMO (Seminario pri Aktivula Maturigo, gvidataj de Stefan MacGill) okazis 11-an de septembro. Grava nova materialo lastmomente preparita donis surprizan enrigardon al la juna membraro de UEA.

Sur la ĉi-venonta paĝo estas baza analizo pri la grado de reunigo tra kvar plej signifaj kontinentoj. Konkludoj: Afriko ne surprizas. Tiu rezulto nur spegulas la demongrafion de la tuta kontinento. La bona pozicio de Latinameriko estas klarigebla grandparte per la mirinda sukceso de la hispanlingva kurso kaj la lerto de UEA enpreni ties kursfinintojn. Tio okazis precipe en Kolombio, Meksiko kaj Ĉilio.

Kontinento	Membroj IM de UEA	Junaj membroj	Proporcio	Landoj
Afriko	98	51	52 %	5
Ameriko Latina	516	193	37 %	5
Eŭropo	1058	106	10 %	5
Azio	574	55	9 %	6

Eŭropo havas mizeran rezulton, kiun ni delonge scias. Sed la granda surprizo de la esploro estas la neĵuna stato de nia azia movado! Neniu imagis, ke ĝi postrestus eĉ Eŭropon! Ni ĉiuj scias, ke de jardekoj Japanio eniris demografian krizon – la lando mem kaj nia movado. Sed kiu imagis, ke Koreio kaj Ĉinio sekvas rapide malantaŭ ni. Azianoj ja havas mirindan kapablon aspekti pli junaj ol ili fakte estas (EKO povus citi multajn ekzemplojn). Sed en la UK kaj ILEI-kongresoj en Koreio en 2018 ni ŝajne dronis en maro de entuziasmaj junuloj. Kial ili ne vidiĝas? Same pri la Kongreso de ILEI en Kunming, suda Ĉinio.

AMERIKO	Membroj IM de UEA	Junaj membroj	% junaj
Brazilo	285	57	20 %
Meksiko	98	57	58 %
Kolombio	79	57	72 %
Argentino	37	14	38 %
Ĉilio	17	8	47 %
SUME	516	193	37 %

AFRIKO	Membroj IM de UEA	Junaj membroj	% junaj
Burundo	43	30	70 %
Senegalo	22	8	36 %
Togolando	19	4	21 %
Tanzanio	7	3	43 %
Ugando	7	6	86 %
SUME	98	51	52 %

EŬROPO	Membroj IM de UEA	Junaj membroj	% junaj
Germanio	399	26	6.5 %
Francio	339	28	8.3 %
Hispanio	147	23	15.8 %
Italio	101	11	10.9 %
Rusio	72	18	25.0 %
SUME	1085	106	10 %

AZIO	Membroj IM de UEA	Junaj membroj	% junaj
Japanio	238	9	4 %
Ĉinio	136	16	12 %
Koreio	80	5	6 %
Israelo	53	6	11 %
Vjetnamio	35	13	37 %
Irano	32	6	19 %
SUME	1085	106	9 %

Klare la AMO-programo devos urĝe okazigi semaririon en unu el tiuj tri landoj por trakti la temon de rejunigo de la komunumo kaj la membraro de UEA kaj TEJO. Ni jam eklaboras starigi tion frue en 2022.

Por povi fini ene de du tagoj, ni devis elekti po kvin landojn el ĉiu kontinento – tiuj kun la plej granda nombro de individuaj membroj de UEA, sed zorgante pri bona trakontinenta distribuo. Por Azio ni allasis ses landojn. Kompreneble, membreco en UEA ne reprezentas la tutan komunumon, kio tendencas esti pli juna. UEA kaj TEJO devas elpensi strategiojn por igi sin pli popularaj por junuloj! Por Eŭropo, eble la sudaj landoj – Hispanio, Italio kaj aliaj, kiuj povos doni utilan gvidon. Surprizas Rusio. Kiel ili sukcesis atingi tiom bonan rezulton?

Por Azio nia sola espero estas rigardi al Filipinoj kaj Inonezio kaj similaj landoj. TEJO nepre devas labori pri Azio kaj Eŭropo!

Kompreneble, membreco en UEA ne reprezentas la tutan komunumon, kiu tendencas esti pli juna. UEA kaj TEJO devas elpensi strategiojn por igi sin pli popularaj por junuloj!

[EKO 2021-38]

Jen reklamo por niaj kursoj kiun ni afiŝas en Facebook:



Esperantofoireningen for Danmark
Dana Esperanto-Asocio / DEA



**et internationalt
verdensomspændende sprog**



**Online gratis
kursus**

15 gange af 90 minutter
Nok til simpel
kommunikation

**kurset starter
i november**

**For information send en mail til:
kurser@esperanto.dk**